

ESPERO

GLASILO ESPERANTSKEGA DRUŠTVA MARIBOR
POLETJE · 2017 · SOMERO

ISSN 2463-8323

130 let esperanta

130 jaroj
de la lingvo
internacia

Iz vsebine te številke:

Delovanje društva v zadnjem obdobju
Zakaj Prežih? Ob izidu knjige Doberdo

Zakaj izginjajo jeziki?

Alma M. Karlin je bila tudi esperantistska

Nekaj o Londonskem esperantskem klubu

Usoda esperantista v Rusiji

Esperanto, skupni jezik Japonske
olimpijade


8. marec

Esperanto na Vzhodnem Timorju

Azijska karavana na 6. Afriški kongres
esperanta

Iz preteklosti...

Zakaj se ljudje ne učijo esperanta?



La vorto de la redaktoro

Komence de la Informilo ni informas vin pri la agado de nia societo en la lasta periodo kaj pri partopreno de niaj membroj en diversaj okazaĵoj.

La centra kontribuajo de la aŭtoro Vinko Ošlak rilatas al eldono de la traduko al Esperanto de romano *Doberdo* de Prežihov Voranc. La libron eldonis eldonejo Prežihova ustanova el Ravne na Koroškem kune kun la Esperanto-Societo de Maribor. La kompleta financa kosto estis kovrita de la eldonejo kaj la slovenaj esperantistoj estas taskigitaj ke ĉi tiun romanon ili distribu tra la mondo.

La sekva kontribuajo estas dediĉita al la 20-a datreveno de la ekzisto de Asocio por Europa Konscio, kiun fondis kaj plejmulte konsistigas la mariboraj esperantistoj.

Jernaja Jezernik atingis novajn konojn pri Alma M. Karlin, pri kio ŝi raportas en sia kontribuajo.

Virineja Kajzer tradukis el la rusa artikolon pri la sorto de rusa esperantisto.

Aliaj kontribuajoj atingis nin el eksterlando.

La unuan el ili sendis Anica Page el Londona E-klubo (LEK) kiu priskribas aktivadon de tiu klubo.

Sekvas kontribuo de la ĵurnalisto Amir Ferkri el Teherano kiu proponas Esperanton kiel oficialan lingvon dum la sekvaj Olimpikoj en Japanio. Plie troviĝas tradukoj al Esperanto de poemoj de ŝeiko Mosleh-od-din Sadia, unu el la plej gravaj poetoj en la persa lingvo (naskita en 1184 en Shiraz kaj mortinta en 1281 samurbe en Persio). Tradukis dr. Keyhan Zanjani el Teherano.

Nova redaktorino de Revuo Esperanto Anna Striganova (kiu redaktas la revuon kune kun sia edzo Dima Ŝevĉenko) verkis pri la 8-a de marto (Tago de Virinoj).

La akompano de Heidi Goes komenciĝas en nia Informilo per raporto pri la kongreso de tri najbaraj landoj, Indonezio, Australio kaj Novzelandio en Bandungo (Indonezio), kiun por ni verkis Ilia Sumilfila Devi, la indonezianino kiun Heidi instruis pri Esperanto. En tiu numero Heidi mem skribas pri sia instruado de Esperanto en Orienta Timoro.

Ni trovis kelkajn tekstojn el la pasinteco, kiujn ni publikigas por vi.

Mario Vetrĥ

Tradukis Zlatko Tišlar

Beseda urednika

Na zaĉetku glasila vas seznanjamo z delovanjem naŝega druŝtva v zadnjem obdobju ter udeleĝbe naŝih ĉlanov na drugih dogodkih.

Osrednji prispevek avtorja Vinka Oŝlaka se nanaŝa na izid prevoda v esperanto - romana *Doberdob* Prežihovega Voranca. Prevod je izdala Prežihova ustanova iz Raven na Koroŝkem skupaj z Esperantskim druŝtvom v Mariboru. Celotni finanĉni deleĝ je bil pokrit s strani Prežihove ustanove, slovenski esperantisti pa so zadolĝeni, da ta prevod posredujejo esperantistom ŝirom sveta.

Naslednji prispevek je posveĉen 20. obletnici obstoja Druŝtva za evropsko zavest, ki so ga ustanovili in ga veĉinoma sestavljajo mariborski esperantisti.

Jerneja Jezernik je priŝla do nekaterih novih spoznanj glede Alme M. Karlin, kar je zapisano v njenem prispevku.

Virineja Kajzer je iz ruŝĉine prevedla prispevek o usodi ruskega esperantista.

Ostali objavljeni prispevki so prispeli iz tujine.

Prvi prispevek iz tujine nam je poslala Anica Page iz londonskega esperantskega kluba (LEK), ki opisuje delo tega kluba.

Sledi prispevek novinarja Amirja Fekrija iz Teherana, ki predlaga, da bi naj sluĝbeni jezik na predstojeĉih olimpijskih igrah na Japonskem bil esperanto. Ob njegovem prispevku je ŝe prevod v esperanto pesmi ŝejka Mosleh-od-din Sadia, enega najveĉjih pesnikov perzijskega jezika (rojen leta 1184 v Ŝirazu, umrl leta 1281 v istem kraju - Perzija/Iran). Prevod je delo dr. Keyhana Zanjanija, esperantista prav tako iz Teherana.

Nova urednica revije Esperanto Anna Striganova (revijo urejata skupaj z moĝem Dimo Ŝevĉenko) je zapisala svoje spomine na 8. marec.

Sled o Heidi Goes se je zaĉela v naŝem glasilu s poroĉilom o Kongresu treh sosednjih deĝel: Indoneziji, Australiji in Novi Zelandiji v Bandungu v Indoneziji, ki ga je za naŝe glasilo napisala Ilia Sumilfila Devi, Indonezijka, ki jo je Heidi uĉila esperanta. V tej ŝtevilki Heidi piŝe o svojem pouĉevanju esperanta na Vzhodnem Timorju.

Naŝli smo nekaj zapisov iz preteklosti, ki smo jih za vas ponatisnili.

Mario Vetrĥ

Enhavo

Agado en la unua duono de la jaro	3
Kial Preĝih?	7
Kial malaperas la lingvoj?	13
Alma M. Karlin estis ankaŭ esperantistino	15
Kiom signifas 130 jaroj de lingvo internacia?	17
Iom pri Londona Esperanto-Klubo	21
La esperantista sorto en Sovetio	23
Esperanto la komuna lingvo de la Japana olimpiko	25
La 8-a de marto	27
Esperanto en Orienta Timoro	29
Azia karavano en la 6-a	
Afrika Kongreso de Esperanto,.....	31
El la pasinteco	34
Kial oni ne lernas Esperanton	36
En memoro de Zlatko Malek	37

Vsebina:

Delovanje druŝtva v zadnjem obdobju	3
Zakaj Preĝih?.....	7
Zakaj izginjajo jeziki?	13
Alma M. Karlin je bila tudi esperantistka	15
Kaj pomeni 130 let mednarodnega jezika?	17
Nekaj o Londonskem esperantskem klubu	21
Usoda esperantista v Rusiji	23
Esperanto, skupni jezik japanske olimpijade	25
8. marec	27
Esperanto na Vzhodnem Timorju	29
Azijska karavana na	
6. Afriŝki kongres esperanta	31
Iz preteklosti	34
Zakaj se lĝudje ne uĉijo esperanta?	36
V spomin Zlatko Maleku	37

Agado en la unua duono de la jaro

Dufoje monate okazas konversaciaj renkontiĝoj, kiujn gvidas Zdenka Rojc kaj fojfoje Izidor Golob. La renkontiĝojn partoprenas antaŭ ĉio membroj de daŭriga kurso, sed ankaŭ aliaj membroj de nia societo kaj eĉ du membroj de la »frata« fevojiosta E-societo. La celo de la renkontiĝoj estas ke la progresantaj kursanoj de la daŭriga kurso ankaŭ aktive uzu Esperanton – do por laŭeble paroli.

El inter kelkaj pasintaj sed ankoraŭ nepriskribitaj okazadoj necesas mencii viziton de la prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio, irlanda diplomato doktoro Seán Ó Riain en aŭtuno 2016 en nia societo. Li priskribis al ni kiel Irlandanoj perdis sian lingvon kaj atentigis nin ke io simila ne okazu ankaŭ al ni.



Gastprelego de Seán Ó Riain en ESM | Gostovanje dr. Seána Ó Riainana v EDM (Foto: Zdravko Kokanović)

Društveni dogodki v zadnjem času

Dvakrat mesečno potekajo konverzacijska sreĉanja, ki jih praviloma vodi Zdenka Rojc oz Izidor Golob. Sreĉanj se udeleĝu jejo predvsem sluaŝatelli nadaljevalnega teĉaja, kakor tudi drugi ĉlani naŝega druŝtva in dva ĉlana "sestrskega" druŝtva ŜED (Ŝelezniĉarsko esperantsko druŝtvo). Namen sreĉanj je, da bi napredujoĉi teĉajniki tudi aktivno uporabljali esperanto – torej, da bi ĉim veĉ govorili.

Od nekaterih minuluh ŝe ne zabeleĝenih dogodkov velja omeniti obisk predsednika Evropske esperantske zveze in med drugim irskega diplomata dr. Seána Ó Riaina v jeseni 2016 v naŝem druŝtvo. Slednji nam je opisal kako so Irci izgubili svoj jezik in nas opozoril, da se ne bi kaj podobnega zgodilo tudi nam .



Al sinjoro Seán Ó Riain ni donacis du librojn en Esperanto de Vinko Oŝlak. | Gospodu dr. Seánu Ó Riainanu smo podarili dve knjigi v esperantu avtorja Vinka Oŝlaka. (Foto: Zdravko Kokanović)

En novembro 2016 gegimnazianoj de la Unua Gimnazio en Maribor prezentis en Salono de modernaj Artoj sian projektlaboraĵon pri Mariboraj gravaj familioj inter du militoj. Inter aliaj la gimnazianoj esploris familion Haas. Pri la familio parolis filinoj de Herta Haas (kiu estas filino de Priska kaj Henriko Haas - fondintoj de la E-societo): Srmena kaj Cvetana Krstev

Meseca novembro 2016 so dijaki Prve gimnazije iz Maribora v Salonu sodobnih umetnosti pred ŝtevilnim obĉinstvom predstavili svoje projektno delo o Mariboru in druĝinah med obema vojnama. Med drugim so dijaki raziskali zgodovino slavne mariborske druĝine Haas. O druĝini sta tudi govorili hĉeri Herte Haas - sestri dr. Srmena in dr. Cvetana Krstev.



Fratinoj Srmena kaj Cvetana Krstev | Sestri Srmena in Cvetana Krstev

En decembro Literatura Societo de Maribor (Literarna hiŝa) gastigis gravan kroatian esperantistinon Spomenka Ŝtimec, kiu prezentis sian novan libron, ĉi-foje ne en Esperanto sed en la kroata lingvo »*La Domo en Mezeŭropo*«.



Božidar Brezinščak Bagola prezentas la verkon de Spomenka Ŝtimec | Božidar Brezinščak Bagola predstavlja delo Spomenke Ŝtimec (Foto: Zdravko Kokanović)

Meseca decembra 2016 je Literarna hiŝa imela v gaste vidno hrvaŝko esperantistko Spomenko Ŝtimec, ki je predstavila siovo novo knjigo, tokrat ne v esperantu ampak v hrvaŝkem jeziku *Dom u srednjoj Evropi*.



Obiskovalci v Literarni hiŝi | Vizitantoj en la Literatura Societo (Foto: Zdravko Kokanović)

La saman monaton sekvis prezento de la traduko de romano de Prežihov Voranc Doberdo en Esperanton eldonita per la mono de la eldonejo »Prežihova ustanova« kune kun la E-societo de Maribor. La romanon senpage tradukis Vinko Oŝlak, kiu ĉe la eldonejo Voranc en 1997 eldonis sian slovenlingvan libron *Klarigo al amiko pri Esperanto*.

La prezento okazis en la kastelo de la urbo Ravne na Koroŝkem. La ĉeestantojn salutis nome de la urba biblioteko direktorino mag. Irena Oder kaj la urbestro de Ravne na Koroŝkem kaj direktoro de Prežihova ustanova, doktoro Tomaž Rožen.



mag. Irena Oder kaj d-ro Tomaž Rožen salutis la ĉeestantojn | mag. Irena Oder in dr. Tomaž Rožen sta pozdravila prisotne

La centra evento fine de la pasinta jaro estis prifesto de Zamenhof-Tago la 10-an de decembro 2016. En la prifesto ĉeestis 34 esperantistoj el Maribor kaj proksima kaj malproksima ĉirkaŭaĵo.

Jerneja Jezernik prezentis al ni slovenan verkistinon Alma M. Karlin. Ĉi-foje ŝi klarigis siajn novajn eksciojn pri la verkistina kontaktoj kun Esperanto.

Vinko Oŝlak prezentis al ni sian tradukon de *Doberdo* milta romano de Prežihov Voranc en Esperanto, kiel oklasis, kial ĝuste ĉi tiu romano... ▶

Istega meseca je sledila predstavitev prevoda Prežihovega vojnega romana *Doberdob* v esperanto, ki sta ga izdali Prežihova ustanova in Esperantsko društvo iz Maribora. Roman je brezplaĉno prevedel esejist, pisatelj, filozof in prevajalec Vinko Oŝlak, ki je pri ĈZP Voranc že leta 1997 izdal knjigo *Pojasnilo prijatelju o esperantu*.

Predstavitev je potekala na gradu v Ravnah na Koroŝkem. Prisotne sta pozdravila v imenu Mestne knjižnice njena direktorica mag. Irena Oder ter župan občine Ravne na Koroŝkem ter predsednik Prežihove ustanove dr. Tomaž Rožen.



La prezenton garnis muzika grupo Hedera Vento kiu kantas ankaŭ en Esperanto | Predstavitev je popestrila glasbena skupina Hedera Vento, ki poje tudi v esperantu

Osrednji dogodek ob koncu minulega leta je bila proslava ob »Zamenhofovom dnevnu« 10. decembra 2016. Proslave se je udeleĝilo 34 esperantistoj iz Maribora ter iz bliĝe in daljnje okolice..

Jerneja Jezernik nam je predstavila slovensko pisateljico Almo M. Karlin. Tokrat je pojasnita nova spoznanja o pisateljĉini povezavi z esperantom.

Vinko Oŝlak nam je predstavil siovo prevod Prežihovega vojnega romana *Doberdob* v esperanto, kako je do njega priŝlo, zakaj prav tiu delo... ▶



Jerneja Jezernik pojasnuje, kako je Alma M. Karlin bila povezana z esperantom (Foto: Zdravko Kokanović)



Vinko Ošlak predstavlja knjigo "Doberdo" (Foto: Zdravko Kokanović)

Inter la ĉi-jaraj okazaĵoj indas mencii renkontiĝon kiun lige al 100-jariĝo de la morto de L.L.Zamenhof la 15-an de aprilo organizis Slovena Esperanto-Ligo sub la titolo *Tago por Esperanto*.

Od letošnjih dogodkov velja omeniti sreĉanje, ki ga je ob 100. obletnici smrti L. L. Zamenhofs 15. aprila organiziralo Združenje za esperanto Slovenije z nazivom *Dan za esperanto*.



Udeleženci dogodka "Dan za esperanto", Ljubljana, Štefanova 11



Ankaŭ ĉi-jare ni partoprenis en la centra evento »Semajno de tutviva lernado« - *Parado de lernado*, kiu okazis la 17-an de majo 2017 en Vetrinjski dvor.

Tudi letos smo se udeležili osrednjega dogodka "Tedna vseživljenjskega učenja" - *Parade učenja*, ki se je odvijala 17. majo 2017 v Vetrinjskem dvoru.



Prezento de nia Societo dum Parado de Lernado | Predstavitel društva na Paradi učenja (Foto: Zdravko Kokanović)



Samteme okazis »Semajno de amatora kulturo«. Ankaŭ en tiu okazo ni preparis (la 18-an de majo) prezenton de la Societo en la ejoj kie ni kutime renkontiĝas – ejo de la Kvartalo Center, Kacova 1

V istem ĉasu se je odvijal "Teden ljubiteljske kulture". Tudi tokrat smo (18. majo) pripravili predstavitev društva v prostorih kjer se običajno sreĉjemo - v prostorih Mestne ĉetrti Center, Kacova 1.

La ĉi-jara konsulta renkontiĝo de slovenaj esperantistoj okazis la 20-an de majo en Polževu. Partoprenis 23 esperantistoj. Dum la konsultiĝa kunveno ni traktis skriban materialon »Programaj evolu-direktoj«

Letošnje sreĉanje esperantistov s posvetom se je odvijalo 20. majo na Polževem. Sreĉanja in posveta se je udeležilo 23 esperantistov. Na posvetu smo obravnavali pisno gradivo "Programska usmeritev" v osnutku.

Ni interkonsentis akcepti la iniciaton de Peter Grbec ellabori logotipon de Slovena E-Ligo, kiu pligrandigos la rekonecon de la aktivadoj.

La diskuto pri la proponita dokumento kaj kolektado de proponoj por la logotipo estas daŭrigata ĝis aŭtuno.

En la dua parto ni pridiskutis proponon por Eŭropa Esperanto-Unio »Starpunktoj pri la uzo de Esperanto en Eŭropa Unio«. La proponon prezentis Tomaž Longyka. Kelkaj partoprenantoj donis siajn rimarkojn (labora – oficiala lingvo, transira periodo, precizeco de Esperanto, Esperanto en la negoca sfero).

Dogovorili smo se, da se sprememo pobudo za izdelavo logotipa ZES, ki bo povečal prepoznavnost dejavnosti.

Razpravo o dokumentu in zbiranje predlogov nadaljujemo do jeseni.

V drugim delu je bil obravnavan osnutek predloga Evropski esperantski zvezi »Stališča o uporabi esperanta v Evropski uniji«. Osnutek je predstavil Tomaž Longyka. Nekaj udeležencev je že podalo svoja gledanja (delovni - uradni jezik, prehodno obdobje, preciznost esperanta, esperanto na poslovnem področju).



Partoprenatoj en de la renkontiĝo en Polževo | Udeleženci srečanja na Polževem (Foto: Zdravko Kokanović)

Post la konsultiĝo la partoprenantoj vizitis kampanan bienon de Josip Jurčič kaj malgraŭ la pluva vetero daŭrigis agrablan amikumadon.

Jurčič en siaj verkoj fundamnetis slovenan literaturan prozan verkadon verkinte la unuan slovenlingvan romanon »La deka frato«, aron da longaj noveloj, la unuan slovenan tragediteatraĵon »Tugomer« kaj aron da malongaj prozaj rakontoj.

La bieno de Jurčič estas nuntempe etnografia muzeo surkampe. En la Domo troviĝas kvin ejoj kun ekspoziciaĵoj; Nigra kuirejo kun forno, »hiŝa« (domaĵo), »kamra« (kamero) kaj aliflanke de la kuireja spaco »ŝtibc« (...?) kaj »klet« (vinejo). ■

Po posvetu in kosilu smo se udeleženci srečanja in posveta odpravili na ogled domaĉije Josipa Jurčiča in kljub deŝevnemu vremenu nadaljevali prijetno druženje.

Jurčič je s svojimi deli postavil trdnaj temelje slovenskemu pripovedništvo; napisal je prvi slovenski roman Deseti brat, vrsto daljših pripovedi, prvo slovensko tragedio Tugomer in vrsto kratkih proznych pripovedi.

Jurčičeva domaĉija je danes etnografski muzej na prostem. Hiŝo sestavlja pet opremljenih prostorov: veŝa s ĉrno kuhinjo in ognjiŝĉem, »hiŝa«, »kamra«, na drugi strani veŝe »ŝtibc« in klet. ■



Panorama rigardejo en Polževo | Razgledna toĉka na Polževem (Foto: Zdravko Kokanović)



Bieno de Josip Jurčič en Muljava | Domaĉija Josipa Jurčiča na Muljavi (Foto: Zdravko Kokanović)

Kial Prežih, kial en Esperanto? Zakaj Prežih, zakaj v esperantu?

Okaze de la apero de la granda slovena primilita romano *Doberdo* elplume de la slovena klasikulo Lovro Kuhar – Prežihov Voranc en esperanta traduko en komuna eldono de »Prežihova ustanova« en la komunumo Ravne na Koroškem kaj de Esperanto-societo Maribor mi kiel la tradukinto volas al la interesitoj klarigi, kial mi antaŭ jaroj komencis traduki ĝuste tiun ĉi aŭtoron kaj tiun ĉi lian tekston – kaj kio min spronis tion ĉi traduki en la internacian lingvon Esperanton. Tiujn ĉi pensojn mi cetere diris dum ĉiuj ĝisnunaj prezentadoj, aranĝitaj en Ravne na Koroškem, en Mariburgo (Maribor) kaj en Slovenburgo (Slovenj Gradec), tamen la valoro de la libro kaj de ĝia aŭtoro meritas tion ĉi kompili kaj redakti en la formon de tiu ĉi notaĵo.


Kial Prežih?

Mia unua memoro, de kiu mi neniel povas »liberiĝi« atingas la trian jaron de mia aĝo, kiam miaj gepatroj min duone portis, duone trenis sur la neĝplena vojo el Fara ĉe Prevaliso (Prevalje) ĝis Kotlje, por tie reverenci al la memoro je la tiam mortinta verkisto Lovro Kuhar. En mia memoro troviĝas neniu vorto, sed nur la bildo de tiu longa peniga vojo kaj la scenaĵo de la aspergado, por kiu mi ne scias, ĉu ĉi estis adresita al la sepultita korpo aŭ nur al ties fotografaĵo, kiel niatempes restis preskaŭ la nura formo adiaŭi de la mortinto antaŭ ties entombigo. ▶

Ob izidu velikega slovenskega vojnega romana *Doberdob* izpod peresa slovenskega klasika Lovra Kuharja – Prežihovega Voranca v esperantskem prevodu v skupni izdaji Prežihove ustanove v občini Ravne na Koroškem in Esperantskega društva Maribor, bi kot prevajalec rad zainteresiranim pojasnil, zakaj sem se pred leti lotil prevajanja prav tega avtorja in tega njegovega besedila – in kaj me je spodbudilo, da sem to prevedel v mednarodni jezik esperanto. Te misli sem sicer povedal na vseh treh dosedanjih predstavitev, ki so bile pripravljene v Ravnah na Koroškem, v Mariboru in v Slovenj Gradcu, a veljava knjige in njenega avtorja si zasluži, da to zberem in uredim tudi v obliki tega zapisa.

Zakaj Prežih?

Moj prvi spomin, ki se ga nikakor ne morem »znebiti«, sega v tretje leto moje starosti, ko so me starši pol nosili, pol vlekli po zasneženi cesti iz Fara pri Prevaljah do Kotelj, da bi se tam poklonili spominu na tedaj umrlega pisatelja Lovra Kuharja. V mojem spominu ni nobene besede, ampak samo slika tiste dolge naporne poti in prizor kropljenja, za katerega ne vem, ali je veljalo napananemu truplu ali pa samo njegovi fotografiji, kakor je danes skoraj še edina oblika slovesa od umrlega pred pogrebom. ▶



Tradukisto Vinko Ošlak kun la libro *Doberdo* | Prevajalec Vinko Ošlak s knjigo *Doberdo*

Sed ĉar ni pri tio poste ofte interparolis, mi kun certeco scias, ke temis pri la morto kaj entombigo de la verkisto Kuhar.

Mia patro, ĉe kiu mi kreskis, kaj mia duonpatrino, kiu por mi estis modela kaj eduka patrino, ne legis la librojn de Kuhar. La duonpatrino bone konis la edzinon de Kuhar kaj pri tio ofte rakontis, kaj la patro havis estimon por la »komunisto, kiu pledis por la kamparanoj, kiujn la komunista povo cetere tre malbone traktis«. Tiam mi ankoraŭ ne sciis, ke la grandulo el Kotlje distingiĝis ankaŭ kun aliaj belaj homaj trajtoj. Tiel mi pli poste de la homoj, kiuj tion travivis, eksciis, ke li el sia malsanuleja ĉambro en Slovenburgo ne permesis depreni krucifikson, kiel super tiu kristana simbolo agresis la germanaj okupatoroj, kiam ili dum kvar jaroj ekregis en tiu ĉi parto de la slovena teritorio, kaj post la milito baldaŭ ankaŭ la liberigantoj. Nek la unuaj nek la sekvaj sur la vandoj de la publikaj institutoj toleris la krucifikson – kaj finfine tiel la unuaj kiel ankaŭ la duaj estis forĵetitaj sur la tombejon de la historio, sen krucifikso kompreneble, kiel por ili decas.

Preĵih atestas, ke li komunisto vere estis kaj tion ne ludis, eĉ malpli tion uzis por propra intereso. En tiu senco li estas elstara fenomeno en Slovenio kaj en la tuta Eŭropo kaj li valoras honoran kaj dankeman rememoron. Per tio mi ne laŭdas lian mondpercepton, kiu estis la aperaĵo de certa tempo kaj cirkonstancoj, sed lian koron, kiu estis, kion en ĝin deponis lia pia patrino kaj kion montris al li lia honesta patro.

Kial Doberdo?

Okazis dum la 70-aj jaroj, kiam sidis kune en la kafejo de la hotelo Orel en Mariburgo la poeto Vladimir Gajšek, Ante Trstenjak, la filo de renoma pentristo kun la sama nomo, kaj mia signifika. Kompreneble ni interparolis pri literaturo. Ante Trstenjak estis nekredebe instruita kaj inteligenta homo. Parte li vivtenis sin per matematikaj enigmoj, kiujn li sendis publici en la mondon. Cetere li posedis ekstraordinaran informitecon pri literaturo kaj historio. El interparoloj kun li mi kiel literatura komencanto lernis pli da historio ol el lernejaj lernolibroj. Mi ne scias, kiel ni atingis la temon, sed subite Trstenjak ĵetis sur la tablon surprizan aserton, ke por li la plej granda slovena prozisto estas Lovro Kuhar. Kiel do, ja ni per la lerneja normado tamen ĉiuj estis adepto de Ivan Cankar. Ne temis pri tio, ke oni Preĵihon prenis por malgranda, sed por preni lin por la plej granda, tio debatiĝis de la defendomuro de la lerneja scio.

En tiu tempo mi tiun por mi novan kaj surprizan rigardon al la slovena prozo ankoraŭ ne povis akcepti, sed dum ĉiuj jaroj pli poste en mi aŭdiĝis kaj min defiis al konfrontiĝo kun mia renoma samgentano kaj preskaŭ samlokano. Mi bezonis multan maturiĝon kaj elprovojn por finfine hisi la blankan flagon de kapitulaco kaj rekoni: Jes, kiel ajn, Preĵih estas la plej granda!

Ke mi elektis inter ĉiuj verkoj de Preĵih ĝuste Doberdon, tio ne okazis pro la proksimiĝinta jubileo de la terura okazado ĉe la fronto de Soča / Isonzo, kiu faras la objekton de tiu granda romano, tiam tio ankoraŭ ne staris antaŭ miaj okuloj.

A ker smo se doma o tem še večkrat pogovarjali, zagotovo vem, da je šlo za smrt in pokop pisatelja Kuharja.

Moj oĉe, pri katerem sem odraŝĉal, in maĉeha, ki mi je bila vzgledna kruŝna in vzgojna mati, nista brala Kuharjevih knjig. Maĉeha je dobro poznala Kuharjevo ŝeno in je o tem večkrat pripovedovala, oĉe pa je imel spoŝtovanje do »komunista, ki se je zavzemaĉ za kmete, s katerimi je komunistiĉna oblast sicer zelo grdo delala«. Tedaj ŝe nisem vedel, da se je veliki Hoĉuljĉan odlikoval ŝe z drugimi lepimi ĉloveŝkimi potezami. Tako sem pozneje od ljudi, ki so to sodoŝivljali, izvedel, da iz svoje bolniŝke sobe v bolnici v Slovenj Gradcu ni dovolil sneti kriŝa, kakor so se nad tem krŝĉanskim simbolom znaŝali nemŝki okupatorji, ko so za ŝtiri leta zavladaĉi v tem delu slovenskega ozemlja, po vojni pa kmalu tudi osvoboditelji. Ne prvi in ne drugi na stenah javnih ustanov in krajev niso trpeli kriŝa – na koncu pa so prvi in drugi bili odloŝeni na pokopaliŝĉu zgodovine, brez kriŝa seveda, kakor jim pristoji.

Preĵih prepriĉuje, ker je komunist resniĉno bil in tega ni igral, ŝe tiĉlo manj, da bi iz tega iztrŝil kaj zase. V tem smislu je izreden pojav na Slovenskem in v vsej Evropi in vreden ĉastnega in hvaleŝnega spomina. S tem ne hvalim njegovega nazora, ki je bil pojav ĉasa in okoliŝĉin, paĉ pa njegovo srce, ki je bilo, kar je vanj polagala njegova poboŝna mati in kar mu je kazal njegov poŝteni oĉe.

Zakaj Doberdob?

Bilo je v sedemdesetih letih, ko smo sedeli v kavarni hotela Orel v Mariboru pesnik Vladimir Gajšek, sin znanega slikarja Anteja Trstenjaka, tudi sam Ante, in moja nepomembnost. Govorili smo kajpada o literaturi. Ante Trstenjak je bil neverjetno izobraŝen in inteligentan ĉlovek. Delno se je preŝivljal s tem, da je v matematikane ĉasopise po svetu poŝiljal matematikane uganke, ki jih je sam sestavljal. Sicer pa je imel izreden razgled po knjiŝevnosti in zgodovini. Iz pogovorov z njim sem se kot mlad literarni zaĉetnik nauĉil veĉ zgodovine, kakor pa iz ŝolskih priroĉnikov. Ne vem, kako smo priŝli na to temo, a nenadoma je Trstenjak vrgel na mizo osupljivo trditev, da je zanj najveĉji slovenski prozaist Lovro Kuhar. Kako, saj smo bili po ŝolski formiranosti vendar vsi cankarjanci. Ni ŝlo za to, da bi imeli Preĵiha za majhnega, a da bi bil prav najveĉji, to se je odbijalo od obzidja ŝolskega znanja.

Tedaj tega zame novega in presenetlĉivega pogleda na slovensko prozo ŝe nisem mogel sprejeti, a vsa leta pozneje se je v meni oglaŝal in me izzival v sooĉenje z mojim znamenitim rojakom in skoraj sokrajanom. Potrebno je bilo preĉej zorenja in preizkuŝenj, da sem nazadnje izobesil belo zastavo predaje in si priznal: Ja, kakor koli ŝe, Preĵih je najveĉji!

Da sem se odloĉil med vsemi Preĵihovimi deli prav za Doberdob, ni priŝlo iz bliŝajoĉe se stoeĉnice straŝnega dogajanja na soŝki fronti, ki je predmet tega velikega romana, tedaj mi to ŝe ni bilo pred oĉmi.

Parte kuntiris min en tiun ĉi verkon peto de la tradukistino de ĝi en la germanan lingvon (cetere ŝi ne estas notita kiel la tradukistino, la subskribita tradukisto, vere ekscelenta konanto de la slovena lingvo kaj literaturo, ŝian laboron reviziis kaj tie tie plibonigis kaj tiel li validas por la tradukanto), ke mi helpu al ŝi elenigmigi tiun kaj tiun karakterizan esprimon de Preĝih, pri kiuj nuntempe havas malfacilaĵojn ankaŭ liaj samlokanoj. Mi ne scias, kiom mia modesta helpo okaze de la germana traduko utilis, ĉiukaze tio min proksimigis al tiu ĉi proza verko. Tiam por mi ankaŭ desegniĝis la konstelacio de tri grandaj literaturaj verkoj, kiuj estiĝis sur-baze de la oka-zado dum la unua mondmili-to. La romano *A Farewell to Arms (Adiaŭ armiloj)* de Ernst Hemingway, *Im Westen nichts Neues (Nenio nova en Okcidento)* de Erich Maria Remarque – kaj la pri-milita romano *Doberdob (Doberdo)* de Pre-ĝih. Du el tiuj tri romanoj rolas sur la sama lo-ko: *Adiaŭ armiloj* kaj *Doberdo*. La diferenco inter Hemingway kaj Preĝih troviĝas en ilia stilo, sed eĉ pli en ilia persona rolo kaj statuso ĉe la fronto de Soĉa / Isonzo, kie ili samtempe ĉeestis sen scii unu pri la alia. Hemingway apogis sian verkadon sur siaj senperaj spertoj kaj oni povas lin preni por genia diletanto en la pozitiva signifo de tiu ĉi kutime false komprenata latina vorto, ja la verbo deligo signifas »mi amas, mi aprezas«, kaj tio signifas, ke la verko estis skribita el amo. Ĉu sen amo ĝi povus esti tiomfoje nove skribita, ĉar intertempe plurfoje perditaj aŭ de la aŭtoritatoj konfiskita? La amerikano ĉe la fronto de Soĉa / Isonzo mem ne partoprenis batalojn, kvankam laŭraporte li estis vundita, siajn rekonajn pri la iro de la militado li ricevis kiel ŝoforo de la ambulanco de Ruĝa Kruco dum interparoloj kun la vunditaj soldatoj. La sloveno mem devis batali en la tranĉeoj de la aŭstra-hungara armeo kaj li ĉion, pri kio li en sia verko raportas, travivis de proksime kaj sur propra haŭto. La rakonto el la romano *Nenio nova en Okcidento* de la germana verkisto kaj pacifisto Erich Maria Remarque okazas laŭ la okcidenta fronto inter la germana kaj franca armeoj.

Tiu ĉi verko estas tiel pli malfacile senpere komparebla kun ambaŭ aliaj verkoj, parolantaj pri la fronto de Soĉa / Isonzo. Mi ne volas la menciitajn tri librojn ordigi en la hierarkian ordon de la literatura validado, sed ĉiukaze mi volas la romanon de Preĝih envicigi en tiun la plej gravan literaturan triopon pri la temo de la unua mondmilito. Hazardo aŭ ankaŭ io alia volis, ke la tuta laboro de la tradukado kaj eldonado de la romano *Doberdo* de Preĝih rezultis en bela libra eldono ĵus je la centa datreveno post la okazintaĵoj, priskribitaj en tiu ĉi libro.

Preskaŭ miraklo...

Nuntempe en Slovenio estas escepta evento, se aperas libro en la slovena lingvo sen la ŝtata subvencio. Sed se aperas libro en la lingvo, kiun en tiu ŝtato komprenas nur kelkcent homoj, kiel tio estas la internacia lingvo Esperanto, tiam oni preskaŭ povas paroli pri miraklo. Kaj tamen malantaŭ tiu ĉi evento troviĝas vivaj homoj kun nomoj kaj funkcioj. ►

Deloma me je v to delo povlekla proŝnja prevajalke tega dela v nemŝĉino (sicer kot prevajalka ni podpisana, podpisani prevajalec, sicer res odliĉen poznavalec slovenŝĉine in slovenske literature, je njeno delo pregledal, ga tu in tam popravil in velja za prevajalca), da ji pomagam razvozlati pomen te ali one znaĉilne Preĝihove besede, s kakršnimi imamo danes teĝave tudi njegovi rojaki. Ne vem, koliko je bila moja skromna pomoĉ nemŝkemu prevodu v prid, vsekakor pa me je to pribliĝalo temu proznemu delu. Tedaj se mi je tudi izrisala konstelacija treh velikih literarnih del, ki so nastala na osnovi dogajanja v prvi svetovni vojni. Hemingwayvega romana *Zbogom oroĝje (A Farewell to Arms)*, Ericha Marie Remar-qua *Na zahodu niĉ novega (Im Westen nichts Neues)* – in Preĝihovega vojnega romana *Doberdob*. Dva od teh treh romanov se dogajata na istem kraju: *Zbogom oroĝje* in *Doberdob*. Razlika med Hemingwayem in Preĝihom je v njunem slogu, ŝe bolj pa v njuni vlogi in statusu na soŝki fronti, kjer sta bila istoĉasno prisotna, ne da bi drug za drugega vedela. Hemingway je svoje pisanje naslanjal na svojo bogato novinarsko prakso in ga lahko ŝtejemo za genialnega profesionalca; Preĝih je svoje pisanje naslanjal na svoje neposredne izkuŝnje in ga lahko imamo za genialnega diletanta v pozitivnem pomenu te navadno napak razumljene latinske besede, saj glagol deligo pomeni »ljubim, cenim«, kar pomeni, da je bilo delo napisano iz ljubezni. Ali bi moglo biti brez ljubezni tolikokrat na novo napisano, ker vmes veĉkrat izgubljeno ali tudi zaplenjeno po oblasteh? Ameriĉan se na soŝki fronti sam ni udeleĝeval bojev, ĉeprav je bil menda tudi ranjen, svoja spoznanja o poteku vojskovanja je dobival kot voznik vozila Rdeĉega kriĝa v pogovorih z ranjenimi vojaki. Slovenec se je sam moral bojevati v jarkih avstro-ogrske vojske in je vse, o ĉemer v svojem delu poroĉa, doĝivljal od blizu in na lastni koĝi. Zgodba iz romana *Na zahodu niĉ novega* nemŝkega pisatelja in pacifista Ericha Marie Remarqua se dogaja na zahodni fronti med nemŝko in francosko armado.

To delo je tako teĝje neposredno primerljivo z obe- ma deloma, ki govorita o soŝki fronti. Omenjenih treh knjig ne ŝelim razvrŝtati v hierarĉiĉni red lite- rarne veljave, vsekakor pa ŝelim Preĝihov roman uvrstiti v to najbolj pomembno literarno trojico na temo prve svetovne vojne. Nakljuĉje ali tudi kaj drugega je hotelo, da se je vse delo prevajanja in izdaje Preĝihovega romana *Doberdob* izteklo v lepo knjiĝno izdajo prav v stotem letu po dogodkih, ki jih knjiga opisuje.

Skoraj ĉudeĝ...

Danes je na Slovenskem izjemen dogodek, ĉe izide kakŝna knjiga v slovenskem jeziku brez drĝavne subvencije. Ĉe pa izide knjiga v jeziku, ki ga v tej drĝavi razume le nekaj sto ljudi, kakor je to z mednarodnim jezikom esperantom, potem lahko skorajda govorimo o ĉudeĝu. In vendar so za tem dogodkom ŝivi ljudje z imeni in funkcijami. ►

En la jaro 2015 grupo de slovenaj entuziasmuloj pri la kinoproduktado el Triesto sub la gvido de la reĝisoro Martin Turk filmis ekscelentan dokumentan filmon kun la titolo *Doberdo* – romano de la ribelanto. La filmo estis prezente projekciita ankaŭ en la kulturhejmo en Ravne na Koroškem. Ĉar mi havis bonŝancon ne maltrafi la prezentadon, mi post la projekciado kun glaso de gastigado interparolis kun la ĉefo de la buroo de la urbestro kaj prizorganto de »Prežihova ustanova« (Institucio de Prežih) Vojko Močnik. Li demandis min, kion mi tiel faras kaj mi pretere respondis, ke mi tradukas ankaŭ la romanon de Prežih *Doberdo* en Esperanton. Li demandis, ĉu mi jam havas eldoniston. Mi diris, ke mi tradukas por mia tirkesto kaj ke cetere mi vidas nenian eblecon ĝin eldoni en libra formo. Li diris: »Do ni eldonos...« Mi ne komprenis tuj, kiu tiu »ni« estu, ja mi sur la kampo de eldonado ne estas tute sen orientiĝo. »Prežihova ustanova« sonis mallonga klarigo. Mi kredis en sinceran pretecon de mia partnero en konversacio s-ro Močnik, helpi ke la libro aperu, sed mi ne kredis, ke tio estas realigebla. Tamen mi akcelis mian tradukadon. Por almenaŭ demeti la laboron finitan. Dume mi komencis pensi pri provleganto, kiu nepre devus tion ĉi lingve kontroli, ja ĉiu esperanta aŭtoro kaj tradukisto senvole enŝovas en sian laboron solvojn el propra lingvo, kiuj ne estas nepre en kongruo kun la esperanta maniero esprimiĝi. Tiel validas la neskribita regulo, ke la manskribaĵon revizie legu iu el la tute fremda lingva grupo. Sed kie tian homon trovi? Nome, sen mono, per kiu oni tian laboron povus pagi. Rapide kaj vere bonrezulte helpis al mi mag. Zlatko Tišljar, mia malnova esperantoamiko el Zagrebo, kiu post la disfalo de Jugoslavio vivas kaj laboras en Mariburgo. Por la lingva reviziado li konsilis al mi la tradukiston kaj leksikografon József Horváth el Hungario. Ne estas tre facile la nekonatan homon peti, ke li akceptu tiel ampleksan laboron kaj faru ĝin sen pago. Se mi tradukus al iu ajn alia lingvo, mi tian komplezon ne povus elpeti. Inter la esperantistoj tio estas alia afero. Ili ne laboras por lingvo, kies portanta nacio estus riĉa kaj potenca kaj tiel oni povus prave atendi por sia laboro adekvatan salajron.

La esperantistoj laboras el profunda konvinko, ke la valida lingva (mal)ordo en la mondo estas baze maljusta – kaj tiun maljustecon oni povus helpe de la neŭtrala internacia lingvo eble forigi kaj tiel kontribui al pli bona interkompreniĝo inter la unuopuloj kaj nacioj. Tial ili cetere ne malakceptas pagon, se ĝi eblas, sed ili estas pretaj ion fari ankaŭ sen mono, kio sendube montras la moralan potencialon de la internacia lingvo.

Sinjoro József Horváth kun sia ĝisfunda kaj preciza laboro savis la adekvatecon de la traduko. Ne estis eble pagi lian ekscelentan laboron, sed la komunumo Ravne na Koroškem kaj Prežihova ustanova sendis al li plurajn ekzemplerojn de la presita libro *Doberdo*, kiu sen lia kunlaboro ne povus aperi. Aparta problemo dum la tradukado estis specifaj terminoj ne nur de la militista slango, sed ankaŭ de la neformala soldata ĵargono, kiel ĝin dum interparoloj uzis soldatoj kaj oficiroj, kaj la verkisto ilin peras laŭ proksimuma notado, kiu ne ĉiam estas konsekvenca. ►

V letu 2015 je skupina slovenskih filmskih navduŝencev iz Trsta pod vodstvom režiserja Martina Turka posnela odličan dokumentarni film z naslovom *Doberdob* – roman upornika. Film so predstavili tudi v Kulturnem domu na Ravnah na Koroškem. Ker sem imel srečo, da predstave nisem zamudil, sem se tam po projekciji ob kozarcu pogostitve pogovarjal z vodjo županovega urada in oskrbnikom Prežihove ustanove Vojkom Močnikom. Vprašal me je, kaj delam, in tako mimogrede sem mu omenil, da prevajam tudi Prežihov roman *Doberdob* v esperanto. Vprašal me je, če že imam založnika. Rekel sem, da prevajam za predal in da ne vidim nobene možnosti, da bi to res kdaj izšlo v knjižni obliki. Rekel je: »Bomo pa mi izdali...« Nisem takoj razumel, kdo naj bi bil ta »mi«, saj na založniškem področju nisem povsem brez orientacije. »Prežihova ustanova«, je bilo dano kratko pojasnilo. Verjel sem v iskreno pripravljenost sogovornika gospoda Močnika, da pomaga knjigi do izida, nisem pa verjel, da bi bilo to mogoče uresničiti. Kljub temu sem prevajanje pospešil. Da vsaj odložim to delo kot opravljeno. Medtem sem začel premišljati o lektorju, ki bi nujno moral to jezikovno pregledati, saj vsak esperantski avtor ali prevajalec nehote vnaša v delo rešitve iz lastnega jezika, ki niso nujno v skladu z esperantskim načinom izražanja. Tako velja nenapisano pravilo, naj rokopise pregleda kdo iz povsem tuje jezikovne skupine. A kje takega človeka dobiti? Namreč brez denarja, s katerim bi tako delo plačal. Pri tem mi je hitro in še kako srečno pomagal mag. Zlatko Tišljar, star esperantski prijatelj iz Zagreba, ki že od razpada Jugoslavije živi in dela v Mariboru. Za jezikovni pregled mi je svetoval esperantskega prevajalca in leksikografa Józsefa Horvátha na Madžarskem. Ni prav lahko človeka, ki ga ne poznaš, prositi, če bi hotel sprejeti tako obsežno delo in ga opravil brez plačila. Če bi prevajal v katerega koli od narodnih jezikov, bi česa takega ne mogel prositi. Med esperantisti je to drugače. Ti namreč ne delajo za jezik, katerega nosilna nacija je bogata in mogočna in torej upravičeno pričakujejo za svoje delo ustrezno plačilo.

Esperantisti delajo iz globokega prepričanja, da je veljavni jezikovni (ne)red na svetu v osnovi krivičen - in da je to krivičnost s pomočjo nevtralnega mednarodnega jezika mogoče odpraviti in tako prispevati k boljšemu razumevanju med posamezniki in narodi. Zato sicer ne odklanjajo plačila, če je to na voljo, a so pripravljeni kaj narediti tudi brez denarja, kar nedvomno kaže na moralni potencial mednarodnega jezika.

Gospod József Horváth je s svojim temeljitim in natančnim delom rešil ustreznost tega prevoda. Ni mu bilo mogoče njegovega izvrstnega dela plačati v denarju, a občina Ravne na Koroškem in Prežihova ustanova sta mu poslali več izvodov natisnjene knjige *Doberdob*, ki brez njegovega sodelovanja ne bi mogla iziti. Poseben problem pri prevajanju so bili specifični izrazi ne le vojaškega jezika, ampak tudi neformalne vojaškega žargona, kakor so ga v pogovorih uporabljali vojaki in oficirji, pisatelj pa jih podaja po približnem zapisu, ki ni vselej dosleden. ►

Troviĝas cetere plurlingva militista terminaro, inter kvin aliaj lingvoj ankaŭ kun Esperanto, sed en ĝi mankas multaj vortoj, kiuj en la romano aperas. La scipovo de la revizianto helpis min multe. La evento, preskaŭ nomebla »miraklo«, estis ebla, ĉar en Slovenio certe troviĝas almenaŭ unu komunumo, kies urbestro (d-ro Rožen) kaj la ĉefo de ties buroo (V. Močnik) siajn promesojn estimas kaj la aferojn pretigas ĝisfine. La samo validas por la eldonejo CERDONIS (A. Golob) en Slovenburgo, kiu la libron formis kaj presis kun plena profesia kvalito kaj en la antaŭkonsentita limtempo.

Kial Esperanto?

Unue kompreneble simple pro tio, ke Esperanto estas la sola lingvo, kiun plenkreska homo, kiu en ĝi ne estas naskita, povas lerni tiel, ke oni en ĝi povas paroli, skribi kaj en ĝin traduki.

Por la traduko de *Doberdo* en Esperanto troviĝas pli profundaj motivoj. *Doberdo* rolas en la cirkonstancoj de plurlingveco kaj ankaŭ montras la lingvan aspekton de la maljusta ordo en la aŭstrahungara imperio, kiu grandparte kontribuis al ĝia fino.

Por la traduko en Esperanton troviĝas ankoraŭ unu motivo, kiu ne havas idealisman karakteron, sed estas en la servo al la nacia intereso. Kiam aperas tiu aŭ alia slovena libro en la germana, franca aŭ angla traduko, kio povas okazi nur surbaze de ŝtata subvencio, la libro cetere estas presita, tamen laŭregule ĝi ne trovas vojon al la aĉetantoj. La libromarkato estas tre fermita merkato, interesita nur por la libroj, kiujn la naciaj eldonejoj mem detektas, dum ne troviĝas granda intereso por la libroj, kiujn en la angla eldonas tiu aŭ alia eldonejo en Labako kaj provas ilin proponi en la angla aŭ

u s o n a libromarkato. En la kazo de la esperanta libro la afero estas tute alia. Kiam Prežihova ustanova la pli grandan parton de la eldonkvanto de *Doberdo* donacis al la slovenaj esperantoorganizacioj, ili la librojn disdonis al unuopaj esperantistoj kaj proponis al ili interkonsenton: ▶

Sicer obstaja večjeziĉen vojaŝki slovarĉek, med petimi jeziki je tudi esperanto, a v njem vendar manjka veliko besed, ki se v romanu pojavljajo. Lektorjevo znanje mi je bilo tu v odloĉilno pomoĉ. Dogodek, ki bi mu skoraj lahko rekel »ĉudeŝ«, je bil mogoĉ, ker je v Sloveniji zanesljivo vsaj ena obĉina, katere ŝupan (dr. Roŝen) in ŝef njegovega urada (V. Moĉnik) obljudo drŝita in ŝvar izpeljeta do konca. Enako velja za zaloŝbo CERDONIS (A. Golob) v Slovenj Gradcu, ki je knjigo oblikovala in natisnila s polno profesionalno kvaliteto in tudi v dogovorjenem roku.

Zakaj esperanto?

Najprej seveda preprosto zato, ker je esperanto edini jezik, ki se ga lahko ĉlovek, ki v njem ni rojen, nauĉi tako, da lahko v njem govori, piŝe in vanj prevaja.

Za prevod *Doberdoba* v esperanto pa obstajajo globljiz razlogi. *Doberdob* se dogaja v okoliŝĉinah veĉjeziĉnosti in prikazuje tudi jezikovni vidik nepraviĉnega reda avstro-ogrskega cesarstva, ki je v izdatni meri pripomogel k njegovemu koncu.

Za prevod v esperanto pa obstaja ŝe en razlog, ki ni idealistiĉne narave, ampak je v sluŝbi nacionalnega interesa. Kadar izide kaka slovenska knjiga v nemŝkem, francoskem ali angleŝkem prevodu, kar se lahko zgodi vedno le na podlagi drŝavne subvencije, je knjiga sicer natisnjena, vendar praviloma ne najde poti do kupcev. Knjiŝni trg je namreĉ dokaj zaprt in je zainteresiran le za tiste prevode, ki jih nacionalna knjiŝna produkcija sama odkrije, ni pa prevelikega interesa za knjige, ki jih v angleŝĉini recimo izda kaka zaloŝba v Ljubljani in jih potem skuŝa plasirati na angleŝkem

in ameriŝkem knjiŝnem trgu. Pri esperantski knjigi je ta pot povsem drugaĉna. Ko je Preŝihova ustanova veĉji del naklade *Doberdoba* poklonila slovenskim esperantskim organizaciam, so te knjige takoj razdelile med svoje ĉlane, pri tem pa velja dogovor: ▶



La soldato Preŝih en forpermeso antaŭ la domo en la jaro 1939
Vojak Preŝih na dopustu pred domĉo hiŝo leta 1939

Legu la libron kaj post tio sendu ĝin kiel donacon al via esperanta korespondanto aŭ amiko en la mondo!

Tiel la pli granda parto de *Doberdo* de Prežih baldaŭ atingos la alcelatan publikon, sen ke por tio devus troviĝi aparta libromarkata reto. Dum la anglaj, francaj, germanaj kaj aliaj tradukoj pliparte troviĝas en magazenoj, la esperantaj libroj iras tra la mondo kaj tiel plenumas la bazan taskon, ke ili estas legataj. Tiel estus bone, se ankaŭ aliaj slovenaj komunumoj komencus imiti la modelon de Ravne na Koroškem. Ĉiu komunumo havas ĉu pli klasikan aŭ pli modernan aŭtoron, kiu estus inda esti sendita tra la mondo. Kaj ĉiu komunumo havas tiom da mono por subteni eldonon de unu en Esperanton tradukita libro por donaci ilin al la slovena esperantistaro – kaj ili tiujn librojn unue mem legos kaj poste ilin kiel donacojn dissendos al siaj amikoj en la mondo. Pli belan kaj simplan kolportadon de la slovena literaturo oni ne povas imagi.

La lasta motivo por traduki la romanon de Prežih en Esperanton estas la penso je estonto. Nuntempe Esperanto estas ankoraŭ juna lingvo, apenaŭ 130 jarojn aĝa. Kalkulante, ke la slovena lingvo bezonis pli ol mil jarojn por estiĝi oficiala lingvo en la ŝtato, do tiel Esperanto troviĝas ankoraŭ en bebojaro kaj la tuta perspektivo ankoraŭ troviĝas antaŭ ĝi. La nacio, kiu nun, kiam ankoraŭ ne estas denseco, almenaŭ iomete investos en prezentadon de sia literaturo en la internacia lingvo, havos en la estonto, se tiu ĉi lingvo eble tamen estos akceptita kiel la dua lingvo por ĉiu terano, neimageblan avantaĝon antaŭ la nacioj, kiuj pri tio nuntempe ankoraŭ ne pensas. Jam nun estas en Esperanton tradukitaj kompare superaveraĝe multaj slovenaj literaturaj verkoj.

